4-a Jaro. N-o 195 APERAS S.A.T. SEMAJNE 28. Junio 1928

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

# SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT 23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27 Administranto: R. Lerchner

## En Sovetio plimultiĝas la pastroj, sed ne la religianoj

En n-o 190 de "S-ulo" estis citita laŭ franclingva ĵurnalo "fakto" pri plinombriĝo de l' pastraro en Ukrainio, kiu ŝajnas timiga por liberpensuloj kaj tutmonda Laboristaro amika al Sovetio. Tamen ni bone scias, ke burĝaj ĵurnaloj ĉiam sciigas al siaj legantoj speciale elektitajn "faktojn" el sovetiaj ĵurnaloj, ne menciante komenton de tiuj lastaj.

Tiu okazo estas bona ekzemplo, por montri al nia sennaciularo la ruzajn metodojn de l' burĝa naciularo.

Efektive, la nombro de l' eklezia pastraro ne nur en Ukrainio nur ĉefe tie), sed en tuta Sovetio iom kreskis. Kio kaŭzis tiun fenomenon? Ĉu plimultiĝo de religianoj? Ĉu organizo de novaj temploj aŭ parohoj? Tute ne.

La Oktobra Revolucio klare evidentigis la kontraŭrevolucian, ekspluatistan esencon de l' eklezio, havinta dum cara reĝimo multegajn kaj riĉegajn bienojn, malavare subvenciata de la cara registaro kaj dum Revolucio batalinta armite kontraŭ Ruĝa armeo. La konservativeco de l' eklezio serioze estis ŝancelata ankaŭ per publika esploro de diversaj "sanktaj restaĵoj" (relikvoj), en kiuj ĉie estis trovataj diversaj objektoj tute ne sanktaj kaj falsantaj homajn restaĵojn. Oni konstatis ostojn de hundoj, vaton, virinajn ŝtrumpojn, buligitan materion ktp. Konstanta senmaskigo de diversaj agmanieroj religiaj kaj ekleziaj, insiste arangita en komenca periodo de l' Revolucio flanke de la registaro, multe helpis al senreligiiĝo de l' laboristaj kaj kamparanaj amasoj.

La Nova ekonomia politiko (1921) fine elvokis krizon en la eklezio. Eĉ la restaĵoj de la burĝaro, ricevinte rajton negoci, iom paciĝis kun la soveta reĝimo. Pli kaj pli kunfandiĝantaj ĉirkaŭ la sovetoj, la laborulaj amasoj pli altgrade malkonfidis la reakciemon kaj konservativecon de la eklezio, kiu staris jam antaŭ la perdo de l' tuta influo al kredulaj amasoj, perdo de siaj jam tiutempe malgrandaj profitoj. Rezulto de tiuj ekonomiaj kaj politikaj faktoroj estis ribelo en la eklezio mem, eksplodo de plej "demokrataj" pastroj kontraŭ la patriarko Tiĥon, atako kontraŭ la ĉefpreĝejo en Moskvo je nomo de Jesuo Kristo. Organiziĝis demokratiigita, "novigita eklezio", gvidata nun de ĉefepiskopo Vvedenskij. La disfalo ne ĉesis. Sekvis organiziĝoj de novaj eklezioj, ekzemple "Renaskiĝo" (plej radikala de eklezia vidpunkto), diversaj memregaj eklezioj en naciaj respublikoj, enkalkulante Ukrainion, kie la disfalo okazis en multajn novajn ekleziajn formiĝojn.

Okazis granda batalo intereklezia kaj eneklezia, kiu fakte estis batalo pri tio, kiu posedos la kredulajn amasojn. Kaj ĉiuj reformoj estis farataj nur pro tio, ke la eklezio neniam estis porlaborula. Oni trovis necese montri kvazaŭ resonadon de l' "demokratia" epoko, adaptiĝi al la novaj cirkonstancoj. Sed kiel tion fari, kiujn reformojn aranĝi — tio estas disputebla kaj bataliga problemo, kiu kaŭzis la disfalon de l' eklezio en multajn sektojn.

Rezulte en samaj loĝlokoj aperis paralelaj novaj episkopoj de nove organizitaj eklezioj, novaj paralelaj pastroj, kiuj batalis pro unu sola preĝejo, aŭ se estis kelkaj preĝejoj, batalis pro tio, kiu kiun posedos. Tiel anstataŭ unu episkopo en sama loko ekestis du aŭ eĉ tri. Krom tio la eklezioj, por plivigligi la religian propagandon kaj por pli ebligi spertan religian gvidadon, instalis novajn episkopojn ne nur en guberniaj urboj (laŭ antaŭmilita maniero), sed preskaŭ en ĉiuj distriktaj urboj. Tamen la kredula amaso ne nur restis la sama nombro, sed ankoraŭ pli malmultiĝis. Jam antaŭ la imperialista milito diakonoj restis nur en plej grandaj parohoj aŭ ĉefpreĝejoj, sed nun laŭ decidoj de ekleziaj kongresoj preskaŭ ĉiu preĝejo havas diakonon por plisolenigi la diservon, por allogi la amason.

Tio estas la kaŭzo, kial kreskis la nombro de eklezia pastraro, kies vicoj estas plenigataj de senlabora burĝaro, de estintaj "grandsinjoroj", kiuj volas manĝi, kaj "la patro ĉiela nutras kaj varmigas ilin", ĉar la eklezio ĝis nun restis en Sovetio la lasta citadelo de l' reakcia propagando kaj batalo, kontraŭ kiu ni cetere nun organizis seriozan atakadon.

Sendube, la religiuloj jam adaptiĝis al la sovetiaj cirkonstancoj kaj ordigis siajn vicojn malordigitajn de la Revolucio. Ili sukcesis per novaj metodoj kolekti ĉirkaŭ si la restintajn kredulajn rondojn; sed novajn kredulojn ili ne akiris. Kunordigitaj falangoj de kreduloj eĉ arogante klopodas ricevi de la sovetia registaro la permeson organizi religiajn lernejojn; certe, sensukcese.

La senreligieco rapide kreskas. Kiam ni diras, ke la Sovetia Ateista Unio nun havas 250 000 membrojn, eble germaniaj K-doj miros: Kiom malmulte! Sed tio nur estas la nombro de organ-